# Logik-enigmo pri Universalaj Kongresoj

| urbo | Fortaleza | Tel Aviv | Berlin | Adelaide | Tampere |
|---|---|---|---|---|---|
| jaro | | | | | |
| dato | | | | | |
| landoj | | | | | |
| vizitantoj | | | | | |
| temo | | | | | |

1. En Fortaleza 2002a okazis la UK de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto.
2. En Tel Aviv partoprenis 57 landoj de la 27a de julio ĝis 1a de aŭgusto.
3. Kie partoprenis 1212 samideanoj estis la kongresa temo „Lingvo kaj kulturo de paco“.
4. En 1999a partoprenis 62 landoj.
5. 1224 personoj kunvenis de la 19a ĝis 26a de julio.
6. 56 landoj diskutis la temon „Diverseco – ŝanco, ne minaco“.
7. En 1995a la UK okazis de la 22a ĝis 29a de julio.
8. En Tampere partoprenis 2443 homoj el 55 landoj.
9. Unu kongreso okazis de la 31a de julio ĝis 7a de aŭgusto.
10. En unu urbo partoprenis 54 landoj.
11. En Adelaide, 1997a, la temo estis „Toleremo kaj justeco en multkultura socio“
12. Unu temo estis „La popoloj – unu mondo aŭ disaj eroj?“
13. En Berlino partoprenis 2712 gesamideanoj kaj la temo estis „Tutmondiĝo – ŝanco por paco.“

Kie partoprenis 1312 esperantistoj? ....................................................................
Kie okazis la UK en 2000a? .......................................................

Solvo el novembra SF.:

1. sabato 2. eklezio 3. Huertas 4. orprezento 5. malario 6. olivo 7. irmaniero
8. okulo 9. nulmeridiano 10. intenco 11. nielo 12. tropiko 13. ebleco
14. neologismo 15. sunbrilo 16. asimili 17. suspekto 18. emulsio 19. soprano
20. teologio 21. adztenilo 22. stadiono 23. ekspansio

Se homo ion intencas, estas eble pli multe ol oni supozas.


# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkompreniĝo**

**jaro 2003** **januaro**


N O V J A R O

Nova jaro venas
kun novaj perspektivoj
kaj elrigardoj al la horizonto.
Kaj ni ĝin solenas
en grandaj kolektivoj
feliĉaj pro la nova jarrenkonto.

Al la belaj vortoj
kaj la novjarpromesoj
en la Silvestra nokto ni sopiras.
Kaj per novaj fortoj
al belaj grandsukcesoj
en pli feliĉaj tagoj oni iras.

*Malte Markheden*

Mi deziras al ĉiuj geamikoj en- kaj eksterlandaj ĉiun bonon kaj ĉiam unu manpleno akvo sub la boato. Fartu bone kaj restu vi sanaj, por ke ni ankoraŭ longtempe scipovas agadi por nia ŝatata lingvo!

Gunter



# Nia landa Zamenhof-tago

En la gastema restoracio „Kurhaus Devin“ en bela parko proksime de Strelasund, la akvokolo inter la insulo Rügen kaj la urbo Stralsund, ĉijare okazis la landa Zamenhof-tago de LAMA. Malgraŭ la malagrabla vintra tempo 17 personoj, inter ili kvar amikoj el Ŝlesvigio-Holstinio kaj Danlando, trovis la vojon al elektita celo kaj travivis agrablajn horojn en amikeca rondo.

La restoracio regalis nin per malgranda matenmanĝo kaj jam povis komenciĝi la programo. Komenence Werner Pfennig prelegis okaze la Zamenhofa naskiĝtago pri kelkaj preskaŭ ne konataj eroj el la vivo de nia ŝatata majstro. Sekvis kvizo pri diversaj lernejaj fakoj kaj dank' al multaj donacemuloj ni havis por ĉiuj partoprenantoj prezojn, eĉ por la lasta. Dum la prezo-disdonado Curt Vogler distris nin per kelkaj konvenaj poemoj kaj per amuzaj ŝaradoj.

De la vintro ĉe ni al la „vintro“ en Brazilo nin gvidis vidbendo pri la UK en Fortaleza, bele prilaborita de Ralf Kuse. Tiel ankaŭ tiuj, kiuj ne povis partopreni, havis impreson pri tiu ĉi granda sudameri-ka lando kaj ties kulturo.



Ĉe muzikprelego antaŭ la tagmanĝo ni konatiĝis kun kelkaj germanaj komponistoj el la 19-a jarcento.

Post la manĝo estis entreprenata promeno sur la duoninsulo Devin, interesa naturprotektita regiono en Stralsund, sed la malagrabla vetero nur permesis mallongan vagadon. Do, ni baldaŭ reiris al la gastema „Kurhaus“, al tradicia kafoklaĉo.

Finfine ni diris adiaŭ ĝis la venonta renkontiĝo kaj kompreneble al la venonta Zamenhof-tago en Neubrandenburg en 2003-a.

Gunter

❖

## Proverboj el la Zamenhofa kolekto

- Proverbo estas sperto - proverbo estas averto.
- Balaaĵon el korto eksteren ne portu!
- Ne kotas besto en sia nesto.
- Iele, iome estas duone malbone.
- Hako post hako estas efika atako.

❖

Kiel kontaktu nin? +493831490003 Gun.Eb@t-online.de